

Eŭropa Bulteno

Majo 2014, Numero 138

ESPERANTISTAJ JUNULOJ EN LA EŬROPA PARLAMENTO



Inter la 9-a kaj la 11-a de majo estis organizita en la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo renkontiĝo de reprezentantoj de internaciaj asocioj de la Eŭropa Unio, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 5.000 junuloj. Ĉeestis ampleksa grupo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inter kiuj Enric Baltasar, de la [Valencia Esperanto-Asocio](#).

La renkonto, nomita [EYE2014](#), konsistis el granda kvanto da prelegoj, debatoj, koncertoj, distraj kaj alitipaj aktivaĵoj, ĉefe en la sidejo de la Parlamento sed ankaŭ en la urbo Strasburgo, sub la devizo "Ideoj por pli bona Eŭropo".

La esperantistaj partoprenantoj ĝuis la okazon montri al la ceteraj partoprenantoj kaj al la laborantoj en la Eŭropa Parlamento, ke Esperanto estas lingvo funkcia kaj ebliganta komunikadon inter junuloj el la tuta kontinento. Pliajn informojn eblas legi en la [retejo de la Valencia Esperanto-Asocio](#).

Enric Baltasar

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN 2014: OLE'!

Jes: "Ole'!", hispana esprimo kies senco estas laŭsignife "Kiel bone! Kiel bele!" kaj laŭetimologie probable el araba esprimo "Je Alaho!" ("Je Dio!").

Kaj certe la lasta hispana kongreso vere meritas esprimon je admiro, gratulemo kaj plezuro.



La 73-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014 en Arundo (hispane: Ronda), provinco Malago, Andaluzio, Hispanio, samtempe kun la 18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. La moto elektita estis "Esperanto kaj flamenko".

Proksimume 150 kongresanoj kaj multaj pliaj partoprenantoj (ĉar ĝenerale programeroj estis malfermataj libere al ĉiuj) spertis la ŝancon ĝui emociajn momentojn, kunviv(ig)i nian lingvon kun samideanoj, lerni je interesaj prelegoj kaj ĉeesti artajn kaj muzikajn spektaklojn. Alvenis kelkaj dekoj da eksterlandanoj kaj menciinde kelkaj nordafrikanoj (Maroko kaj Tunizio).

La nombro de programeroj estis tre alta kaj same la kvalito.

Prelegoj estis proponataj pri multaj temoj: pri Eŭropa Unio (Rafaela Urueña kaj Thierry Saladin), Maroko kaj Nordafriko (Rikardo Felipe Albert Reyna, Mounir Abjiou kaj Dorota Parzyszek), Massignado kiel helpo por instruado (Viktoro Solé), Lingvoj de Afriko (ĝenerale Francisco Javier Moleón kaj pri la franca en Nordafriko Eduardo Berdor), Esperanto kaj socio kaj varbado (Enric Baltasar), Sociala Ekonomio (Félix Jiménez) kaj Oficiala instruado de Esperanto (Katalin Kováts). Ankaŭ estis atelieroj kiel pri Vikipedio (José María Salguero "Kani") aŭ pri kreado de videoj (Miguel Gutiérrez), Ĉefa temo estis "Instruado de Esperanto" (tie okazis la "1-a Konferenco pri instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo") Tiukadre 15 homoj realigis la KER-ekzamenojn (je nivelo B1, B2 kaj C1) kun oficiala valoro laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro de la Konsilio de Eŭropo (vidu pri tio en: www.edukado.org). Krome estis prezentitaj libroj (de niaj poetoj Miguel Fernández kaj Ángel Arquillos).

Ĉiutage estis programitaj muzikaj spektakloj: emociigaj interpretoj de la kvaropo Sinkopo kaj de Miguel Fernández dum la malfermo, kanta muzika kaj danca spektaklo el aŭtentika flamenko, koncerto de la alandalusmuzika bando Turat Al-


Andalus, la ĉiam vigliga JoMo kaj la kantado de lokaj artistoj hispane... kaj esperante! Menciindas la brilaj interpretoj de la kantistino María Villalón (kies faman kanton "La pluvo" interpretis en esperanto kaj spekteblas en "youtube").

Danke al agado de Miguel Gutiérrez Adúriz, multajn programerojn oni povas (re)vidi per interreto en: <http://www.youtube.com/user/esesperanto>.

Neeviteble indas substreki ke la urbo estis vere alloga kaj vizitinda. Fakte multe da turistoj svarmis dum tiuj tagoj kiel sekvo de tiamaj romantikaj vojaĝantoj (kiel W. Irving aŭ Rainer Maria Rilke) kiuj iam venis viziti ĝin.



Kiel prave sugestis la rezolucio aprobita de HEF, "Arundo mem, gasturbo de la Kongreso iĝis, krom nekomparebla kadro por la disvolvo de la Kongresa programo, danke al ties fama ponto, simbolo de la celo de nia ponto-lingvo: Esperanto".



La kongreso en la urbo de mirinda ponto estis ŝanco por kunligi arton kaj kulturon, eŭropanojn kaj (nord)afrikanojn, amuzon kaj instruon.

Je la fino, okazis celebros de la poezio kaj teatro farita de multaj volontuloj en nova eldono de la spektaklo nomata "Vivu la teatro!" majstre enkondukita de Ana Manero kaj Miguel Fernández, nia mirinda artisto kiu finis proponante simpatian toston. Tiam, je la fino, laŭ tradicia formulo prononcata duope (de ĥoro kaj korifeo) kiu (inter aliaj pripensoj) antaŭ ol tosti menciis: *La drinkanto... ebriiĝas. / La ebria... endormiĝas. /*

La endorma... ne pekas./ La senpeka... iras en la ĉielon./ Por ĉiel-iro, frato, / do trinku ni ĝis sato!

Persone, mi kore dankas la agadon de la kongres-kontribuintoj kaj de la organizintoj: Fátima, Juan, Chema, Ángel, Mariló, Karmela, Carlos... DANKON kaj "OLE'!" al ĉiuj!

Lorenzo Noguero

DUM EKSTERLANDA VOĈDONADO AL EŬROPA PARLAMENTO (GRUNDTVIG PROJEKTO)

La 25-an de majo 2014 en Pollando okazis unu el plej malĉeestaj elektoj al Eŭropa Parlamento – partoprenis la balotadon malpli ol 24 % de rajtigataj civitanoj.

Fone de tia statistiko ni volas montri, ke esperantistoj estas bonaj EU-civitanoj, ĉar la pola 27-persona grupo estinta tiam en Nederlando, eĉ ŝanĝis programon de vizitado por aranĝi eblecon voĉdoni en Pola Ambassadejo en Hago. Aldonita foto montras nian ideocon - ni ĉiam kaj ĉie zorgas por indiki ke ni estas polaj esperantistoj kunligitaj en EU. Ĝuste tial ni dekoracias nian grupon per 3 diversaj flagoj: la pola, la Esperanta kaj la eŭropunia. Tio revokas tujan reagon de rigardantoj – oni demandas pri signifo de kunligitaj, parte ne konataj (Esperanto) flagoj... Tiam iĝas la okazo ion rakonti pri la lingvo, reklami E-movadon kaj substreki nian civitanan engaĝiĝon – polan kaj eŭropunian.

Al Nederlando ni veturis pro Eduk-Kultura Seminario organizita de Fondaĵo Edukado.net, kadre de nia komuna Partnera Projekto de GRUNDTVIG – programo "Lernado dum la tuta vivo" 2013-2015. La temo de la projekto estas "Kiel instrui pri multkultureco de Eŭropo?". Partoprenas ĝin 4 neregistaraj organizaĵoj el Germanio (GEA – Filio pri Klerigado kaj Kulturo en Herzberg/Harz), Hungario (Kultura Esperanto Asocio- Budapeŝto), Nederlando – Edukado.net en Hago kaj Pollando (Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sacz), kiu estas iniciatinto kaj Kunordiganto de la projekto.



Ĝis nun ni sukcesplene realigis jam duonon de la projekta plano: vintre estis organizitaj en Pollando 2 metiejoj pri kutimoj kunligitaj kun la Kristnaska periodo– Adventa kaj Karnavala ĉe polaj montaranoj. Ties resumo okazis dum 4-taga januara Seminario por ĉiuj projektaj partneroj. Tre riĉa, diverskampa programo eduk-sciencia, kulturkleriga, folkloro,



landkona kaj integra – ofertis larĝan aspekton de la temo kaj plenumis la devon de la pola partnero. La dua renkontiĝo planita por esplorado estis la frisa. Kial ekinteresis nin Frislando, minoritata etno kun ĉ. 700-mil frisanoj en Nederlando? Pro sia eksterordinara historio, kiam de la tempo de Romia Imperio, frisoj posedis nek ŝtaton, nek

propran teritorion, estinte dissemataj norde en Nederlando kaj Germanio kaj sude de Danlando... Sed - dum centoj da jaroj ili kultivis siajn lingvon, kutimojn, specifan kulturon kaj tiamaniere savis nacian identecon! Tion oni atingis ĝuste danke al senĉesa protektado de sia kultura heredaĵo. Tiu ĉi ekzemplo montras la signifon kaj la forton de ĉies lingvo kaj kulturo por nacia pluekzisto.

Nun frisoj jam havas oficialigitan sian lingvon kiel la duan en Nederlando, estas ankaŭ kelkaj frisaj parlamentanoj kaj videbla Civitana Movado, sed ne ankoraŭ partia. Dum 4-taga vizito en Nederlando ni havis okazon ekkoni ankaŭ juvelojn de nederlanda kultura heredaĵo – muzeojn kaj arkitekturon de Amsterdamo, belecon kaj mondpacan signifon de Hago, ŝipveturis tra kanaloj, promenis ĉe la marbordo, gustumis nederlandajn specialaĵojn.

Kaj du postaj tagoj estis donacitaj tute al Frislando. Planinte la aventuron, ni eĉ ne supozis, kiom interesa kaj riĉa estos tia esplorado pri frisoj. La frisan programon preparis Katalin Kovats, konata pro sia perfekteco kaj respondeco, do oni povas imagi, ke ŝi donis al ni multe pli ol ni devis kaj povis ricevi!

En la programo helpis ŝin ŝia edzo Sylvain Lelarge kaj frisaj artensembloj de muziko kaj danco: Kajto, Kapriol kaj fama seniora folkloro danckantgrupo Ljouwerter Skotsploech. Ili kantigis kaj dancigis nin, rakontis pri kulturo de 1850-a jaro, respondis al ĉiuj demandoj. Estis ebleco viziti frisajn urbetojn kaj vilaĝojn – vivantajn skansenojn, neesprimeble belajn.

Dum la vizito-tagoj, la tuta partnera grupo – ĉ. 60 personoj – klerigis, kulturiĝis, amuziĝis kaj amikiĝis.

Malfacile estas kalkuli, kiom da grandiozaj momentoj ni jam sukcesis travivi danke al PP GRUNDTVIG. Kaj antaŭ ni estas ankaŭ gravaj venontaj esploroj de la dua parto de la projekto: en aŭtuno 2014 la Seminario pri kultivado de vinberoj kaj produktado de diversregionaj vinoj dum Festo de Vino en Hungario kaj la fina esplorado de kulturaj popolaj kutimoj – Pentekosta Festeno en majo 2015 en Herzberg/Harz.

La eŭropunia projekto GRUNDTVIG vere donis/donas la eblecon koni diversajn kulturojn kaj amikiĝi ene de EU.

Halina Komar

La fotoj – Janusz Skalski (ambasadejo), Katalin Kovats (Pacpalaco en Hago)

EN LA GERMANA, MI PETAS

(Tradukita artikolo el Sueddeutsche Zeitung de Robert Roßmann)

<http://www.sueddeutsche.de/politik/uebersetzung-von-eu-dokumenten-in-german-please-1.1924675>

„La germana estas la plej ofta denaska lingvo en EU, tamen en Bruselo multaj dokumentoj haveblas nur en la angla kaj franca. Tio malkontentigas la germanan Federacian Parlamenton. Tial ties vic-prezidanto s-ro Singhammer estis en Bruselo.

La kvantoj estas gigantaj. Ekzakte 2 024 481 da paĝoj la getradukistoj de la Eŭropa Komisiono tradukis pasintjare en aliajn lingvojn. 330 milionojn da eŭroj jare kostas la laboro de la 'Ĝenerala Direkcio pri Tradukado', preskaŭ 2500 dungitoj laboras en ĉi tiu institucio. Per ĝi verŝajne eĉ eblintus krei pacon en Babilono.

Por la Federacia Parlamento tio tamen ne sufiĉas. Laŭ la germanaj parlamentanoj necesus traduki ankoraŭ pli en Bruselo. Ĉar malgraŭ la klopodoj de la Ĝenerala Direkcio, la Berlinaj parlamentanoj daŭre ne ricevas multajn dokumentojn en la



germana. Tial la vic-prezidanto de la Federacia Parlamento, Johannes Singhammer, veturis al Bruselo por du tagoj por preparoli kun la respondeculoj la bezonegojn de siaj gekolegoj.

„La proporcio de la tekstoj tradukataj en la germanan eĉ malkreskas“, diris ĉi tiu politikisto el partio CSU. Pli kaj pli „da dokumentoj deklariĝas kiel simplaj labordokumentoj, kiuj ne plu devas esti tradukataj el la angla“. Tio laŭ li ne akcepteblas, ĉar ofte temas pri gravaj decidoj.

Pri tio la vic-prezidanton apogas voĉdono de la Federacia Parlamento. Pasintjare ĝi decidis pri jena petdokumento de grupo da parlamentanoj: „Subteni kaj sekurigi germanan lingvon“. En ĝi la delegitoj plendas pri la stato de aferoj en Bruselo kaj Strasburgo. Ĝi diras ke la germana estas „la plej parolata gepatra lingvo en Eŭropa Unio“; krome ke ĝi estas aparte disvastigita fremdlingvo, kaj ke entute ĉiu tria civitano de EU regas la germanan. Tamen tiu-ĉi lingvo, „kaj en la ĉiutaga interna laboro de EU kaj ties komisionoj kaj en la influo de EU eksteren, ne havas la saman signifon kiel la angla kaj franca“. Sekve „multaj dokumentoj gravaj por debatoj kaj decidoj aŭ tute ne aŭ nur nekomplete aperas en germana lingvo“.

Tial la Federacia Parlamento postulis de la germana registaro ke ĝi zorgu pri „egalrajtigo de la germana kiel laborlingvo“. Sed de post tiam fakte okazis nenio.

Ĉi-tie ne temas pri harfendado

Ankaŭ tial s-ro Singhammer nun vojaĝis al Bruselo. Tie interalie li renkontiĝis kun la Ĝenerala Sekretariino de la Eŭropa Komisiono, Catherine Day, kaj kun membro de la kabineto de José Manuel Barroso, prezidanto de la Eŭropa Komisiono. „Kialo por mia vojaĝo ankaŭ estis la novaĵo ke en la tradukdepartamentoj eĉ okazu ŝparoj“, diras s-ro Singhammer. Laŭ li, la ĝenerala sekretariino Day certigis al li ke en la Komisiono

momente ne estas tiaj planoj. Samtempe tamen li eksciis ke en la Eŭropa Parlamento la afero estas alia. Tie oni intencas starigi esplorservon por kiu uziĝu postenoj el la traduka fako. Tiel estonte „eĉ malpli da tekstoj tradukiĝos“.

„Ĉi-tie ne temas pri harfendado pri tio kiaj tekstoj tradukendas kiulingven“, diras s-ro Singhammer. Laŭ li, multaj temoj estas tiom komplikaj ke ne eblas pridiskuti ilin kun certeco en fremda lingvo. En la Federacia Parlamento, "kelkaj komisionoj jam rifuzis pridebati certajn submetiĝojn ĉar ili disponeblis nur en la angla". Tamen bedaŭrinde „ofte estas la sekvo ke Bruselo faras decidojn sen germanaj opinioj“.

Sed, daŭre laŭ li, la Federacia Parlamento ankaŭ havas problemojn kun tekstoj kiuj ja tradukiĝas. Unu ekzemplo estas la progresraporto de la Eŭropa Komisiono pri Turkio. Ĝi aperis meze de oktobro en la angla. La germana traduko – eĉ ne oficialigita – tamen disponeblis nur en decembro, tiam la debato pri la raporto jam delonge finiĝis.

Spirito kaj animo de Eŭropo damaĝataj

En la eŭropuniaj tradukservoj „kompreneble eblas ŝpari multe da mono“, diras s-ro Singhammer. Tio tamen kaŭzus „damaĝojn al la spirito kaj animo de Eŭropo“. Ĉar je la fino Eŭropo bezonas „pli da memidenteco“. Sed tiu-ĉi povas ekzisti nur se komunikado eblas ankaŭ en la propra lingvo.

330 milionoj da eŭroj estas multe da mono. Po EU-civitano tamen la Komisiona Tradukservo tiel kostas nur 65 (eŭro-)cendojn jare. Eĉ se oni kunkalkulas la elspezojn de ĉiuj eŭropuniaj institucioj – do ekzemple de la Parlamento de EU – oni atingas nur du eŭrojn.


Tial la kristandemokrata kaj la socialdemokrata partioj germanaj postulas en sia koalicia kontrakto, senkonsidere al la eblaj kostoj, ke en la eŭropuniaj institucioj la germana estu finfine „ankaŭ praktike egaligita al la du aliaj laborlingvoj, la angla kaj la franca“.

(tradukis Sandra Schweder)

SUR LA PAŜOJ DE DOKTORO ESPERANTO

Mi bone scias kaj estimas la valoran agadon de mia malnova, intima amiko Kostas Kiriakos.

Mi bone scias, ke li neniam ĉesas labori por io imprese signifa, mi ankaŭ sciis, ke li lastatempe longe kaj penige laboris por sia nova verko pri kiu kelkfoje li petis de mi iajn ne tre signifajn konsilojn.



Mi, do, sciis kion mia sagaca amiko preparis, sed malgraŭ tio nun, kiam mi havas en miaj manoj la frukton de tiu lasta laborado de Kostas, mi estas surprizita, mirinde impresita, ĉar mi tenas la plej belan esperantan libron kiun mi ĝis nun vidis.

Estas ja evidente ke mi ne povas moderigi mian entuziasmon, do mi diru ke mi fiere tenas la lastan, ankoraŭfoje dulingvan, verkon de Kostas Kiriakos “Sur la paŝoj de d-ro Esperanto”.

Ĝi estas ne nur unu ankoraŭ belega libro de Kostas, sed tre signifa, valora, necesa por la estonteco de nia movado, verko, en kiu estas prezentata per koncizaj tekstoj la agado kaj ofero de 580 eminentaj esperantistoj de ĉiuj epokoj, el 75 landoj.

Temas pri la sendube plej gravaj laborantoj de la unuaj tempoj de la tutmonda E-movado, sed ankaŭ pri la pli postaj, eĉ pri la nuntempaj plej signifaj, laŭ la aŭtoro, esperantistoj, pri la personoj kiuj kreis, progresigis, konservis, antaŭenigis kaj konstante, sukcese antaŭenigas la aferon de Esperanto en la tuta mondo.

Sen permeso de la aŭtoro, mi rapidas diskonigi la bonan novaĵon al la partoprenantoj de tiu ĉi nia amika rondo kaj publike, kiel eble plej altvoĉe laŭdi kaj gratuli mian karan amikon Kostas Kiriakos.

Spiros Sarafian

SUKCESA PROGRAMOFERMO EN GHERLA /Szamosujvar/

Inter la 28-a de aprilo kaj la 3-a de majo 2014 okazis la fina renkontiĝo de la plurpartnera Komenius-programo “Diversaj profesioj”. Dank' al Mimi Berariu, la animantino kaj la animo de ĉi tiu aranĝo, mi povis partopreni en la unuaj tri tagoj de la evento. Ĉar ĉiuj partoprenantoj – de Bulgario, de Italio, de Germanio kaj de Litovio - alvenis ĝis dimanĉo vespere, la aranĝo povis komenciĝi la 28-an de aprilo, lundon matene, per la akcepto kaj bonvenigo far la direktoro de la Liceo Ana Ipatescu, sinjoro Radu Ielcean. Post la salutvortoj kaj post la disdono de la ŝildetoj, la lernantoj povis viziti la centron de la urbo, dum la instruistoj kafumis kaj babiladis en la biblioteko de Mimi.

Sek vis programero, dum kiu la fremdlandaj partoprenantoj prezentis sian imagon pri Rumanio. La bulgaroj akcentis la turismajn kaj kulturajn valorojn de Rumanio, la metodaj germanoj trarigardis la historion de Rumanio ekde la romia konkero ĝis la NATO- kaj EU-membrecoj, la litovoj prezentis amuzan revuon de la rumaniaj rekordoj, akcentinte pri la grandega ortezoro de Rumanio, dum Italio prezentis tre personigitajn impresojn pri la rumanoj, bazitajn sur la kontaktoj kun rumaniaj enmigrintoj en Italio.



Posttagmeze oni vizitis la armenan katedralon, ĝuante la tre spritan prezentadon de sinjoro Ioan Esztegar, kuratoro de la katedralo kaj prezidanto de la armenoj de Gherla, spicita per ĝuidaj anekdotoj. La vizito kulminis ĉe pentraĵo de Rubens, kiun oni gardas en aparta kapelo.

La dua tago komenciĝis per vizito de la salminejo de Turda /Torda/. Estis interesa sperto por ĉiuj, kaj la trihora vizito ebligis al la lernantoj konatiĝi kun la malnovaj teknikoj de salminado, admiri la grandegajn kavojn de la salminejo, kaj amuziĝi pri la novaj aranĝoj de la minejo.

Sekvis la vizito en Cluj-Napoca /Kolozsvar/, ĉefurbo de Transilvanio, kiu komenciĝis en la urbocentro, ĉe la gotika katolika katedralo Sankta Mikaelo kaj la statuo de la Reĝo Matiaso la 1-a de Hungario, kiu naskiĝis en la urbo. Estis interese por la litovoj vidi inter la flankfiguroj de la monumento la figuron de Bathory Istvan, la avo de ilia Granda Duko Steponas Batoras, reĝo de Polando inter 1576-1586. La partoprenantoj havis la okazon vidi famajn monumentojn de la malnova urbo, inklude la Nacian Teatron.

Dum la tria tago la partoprenantoj havis la okazon informiĝi pri diversaj karieroj. Komence oni vizitis la meblofabrikon de Gherla, kun la gvidado de Adrian, ankaŭ esperantisto. Estis interese vidi la procezon, ekde la arbotrunkoj ĝis la finitaj mebloj. Fine de la vizito ĉiuj partoprenantoj ricevis etan donacon. Posttagmeze oni veturis denove al Cluj-Napoca, kie oni vizitis la Teknikan Universitaton, konatiĝinte kun la plej novaj teknikoj de maŝinfabrikado.

Vespere, la lernantoj pretigis la "Vesperon de la talentoj", kiun, bedaŭrinde, mi jam ne povis ĉeesti, sed pri kio mi aŭdis, ke ĝi estis tre sukcesa. Por aliaj detaloj bonvolu viziti la paĝon:

niaj-profesioj.webnode.com

Jozefo E. Nagy

SENDITA PLENDO AL EŬROPA OMBUDSMANO

La 14-an de majo mi sendis al eŭropa ombudsmano nian plendon pro la malakcepto de la propono al Eŭropa Komisiono por eŭropa popola iniciato uzi esperantan tekston por Eŭropa himno. En ĝi enestas ankaŭ la malneta jura akto (kiu entenas la tekston kun traduko, kaj ligo al la kantado de la himno). Mi ankaŭ sendis papere la necesan formulaĵon, la eldirojn de la kroataj kaj irlandaj prezidantoj (mi angligis tiun de la kroata prezidanto), de la irlandia ministrino pri eŭropaj aferoj, la respondon de la Komisiono de la 31-an de majo 2012 kaj mian respondon al tio la 2-an de junio 2012,

la gazetaran komunikon, ktp. Guido Ricci faris kelkajn etajn jurajn ŝanĝojn al la letero, kiujn mi akceptis.

Seán Ó Riain

ETNOLOGIA MAPO LISTIGIS ĈIUJN MONDAJN LINGVOJN

Internacia etnologia asocio Ethnologue kunmetis liston de ĉiuj lingvoj en la mondo. Inter ili estas ankaŭ Esperanto. Tio estas grava agnosko al Esperanto ĉar ili kolektas nur etnajn lingvojn. Ili faris escepton pri Esperanto ĉar ĝi estas efektive uzata kaj kondukas kvazaŭ etna lingvo. Ĝi estas vivanta, evoluiĝanta kaj posedanta sian kulturon kaj ĝi eĉ havas denaskajn parolantojn.

Ĉar ili listogas la lingvojn laŭ landoj, kaj E-o ne havas sian landon, oni metis ĝin al Pollando pro ĝia tiea deveno.

Vi povas trovi la liston de lingvoj en ilia paĝaro www.ethnologue.com kaj pri Esperanto ĉi tie: <http://www.ethnologue.com/about/language-info>.

Z. Tišljár

EŬROPAJ BALOTOJ KAJ ESPERANTO

EŬROPO-DEMOKRATIO-ESPERANTO EN EŬROPAJ BALOTOJ

En Francio, 33 609 homoj voĉdonis por la listoj Espéranto, langue commune équitable pour l'Europe (Esperanto, justa komuna lingvo por Eŭropo).

Tio estas 4 665 pli ol en 2009.

Tiujn listojn subtenis la partioj

Europe Démocratie Espéranto (la franca partio Eŭropo Demokratio Esperanto) kaj Europe Liberté (Eŭropo Libereco).

En ĉiuj balotejoj, la voĉdonantoj havis la okazon vidi niajn voĉdonilojn

kun la skribaĵo : **Espéranto langue commune équitable pour l'Europe**

<http://www.ede2014.fr/imprimez-votre-bulletin-de-vote/circonscription-ile-de-france/>

Didier Janot

EKOLOGIE DEMOKRATIA PARTIO DE GERMANIO AFIŜAS EN ESPERANTO

La germana partio ödp, "Ekologie Demokratia Partio", kiu gajnis unu seĝon en la EU-parlamento, eldonis sinprezenton, 11 p., en Esperanto.

Mencio sur <http://wahlen.oedp.de/themen/wahlprogramm/europawahl/>

Jam antaŭe ili enmetis en sian EU-elektan programon: "EDP subtenas klopodojn por la plibonigo de la rekta komunikado inter la EU-civitanoj, ekz. per la uzado de la

neŭtrala, internacia lingvo Esperanto."

Indas nun fari al ili saĝajn kaj realismajn proponojn (kiel subtenon de informado pri Esperanto) kaj ne la revojn kiel kantadon de la EU-himno en Esperanto aŭ la uzadon de Esperanto kiel lingvo en EU-institucioj...

wahlen.oedp.de

Lu Wunsch-Rolshoven

MANIFESTO DE JUNAJ VERDULOJ ANKAŬ EN ESPERANTO

Mi havas kuraĝigan mesaĝon: la junaj verduloj publikigis sian Manifeston 2014 ankaŭ en Esperanto.

Kaj sube jen la provizora rezulto koncerne la frakcion Verduloj/Regionalistoj en la nova EP.

Manifesto 2014 de la Federacio de la Junaj Europaj Verduloj (FYEG/FJEV) ankaŭ en Esperanto:

(en, eo, es, gr, lt, pl, se) <http://www.reclameurope2014.eu/downloads/>

Kaj jen la **mem-prezento de FJEV/FYEG** (ek de 2010 ankaŭ en Esperanto)

(eo kaj aliaj) <http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg>

Manfred Westermayer

DU MEMBROJ DE EŬROPA PARLAMENTO POR NOVA SLOVENIJA

Dum la balotoj por EP en Slovenio la partio Nova Slovenio gajnis du parlamentanojn. Kial tio gravas por ni? Ĉar la prezidantino de tiu partio estas esperantistino Ljudmila Novak kaj se en la EP estos io rilata al Esperanto ili certe subtenos tion. Temas pri Lojze Peterle kaj Franc Bogovič.

Zlatko Tišljar

POLAJ MEMBROJ DE EŬROPA PARLAMENTO KAJ ESPERANTO

Dum la balotoj la 25an de majo 2014 iĝis membroj de Eŭropa parlamento pluraj simpatiantoj de Esperanto kaj eĉ esperantistoj.

El la partio *PiS (Prawo i Sprawiedliwość) Rajto kaj Justeco

eniris la Eŭropan Parlamenton

1. s-ino Anna Fotyga (favora por Esperanto), eks-ministrino de Eksterlandaj Aferoj el Pomerio

2. s-ro Ryszard Czarnecki (**esperantisto**), eks-ministro pri la Europa Integriĝo) el

Grandpolio

3. d-ro Mirosław Piotrowski (favora por Esperanto) el Lublino

ne eniris la Eŭropan Parlamenton

4. s-ro Jarosław Sellin (favora por Esperanto) el Pomerio

El la partio *PO (Platforma Obywatelska) Civitana Platformo

eniris la Eŭropan Parlamenton

1. s-ro Janusz Lewandowski (favora por Esperanto), eks-komisaro de Europa Komisiono el Pomerio

2. Jarosław Wałęsa (favora por Esperanto) el Pomerio

3. prof. d-ino Barbara Kudrycka (favora por Esperanto), eks-ministrino de Scienco kaj Supera Edukado) el Olstino, loĝas en Bjalistoko

4. s-ro Jacek Saryusz-Wolski (favora por Esperanto) el Lodzo

5. s-ino Róża Thun (favora por Esperanto) el Krakovo

6. prof. d-ro Jerzy Buzek (favora por Esperanto), eks-prezidanto de Europa Parlamento el Silezio

7. s-ro Bogdan Zdrojewski (favora por Esperanto), Ministro de Kulturo de Pollando el Vroclavo

ne eniris la Eŭropan Parlamenton

1. s-ino Małgorzata Handzlik (esperantistino) el Silezio

El la partio *SLD (Sojusz Lewicy Demokratycznej) Alianco de Demokratia

Maldekstrularo

eniris la Eŭropan Parlamenton

1. prof. d-rino Krystyna Łybacka (favora por Esperanto), eks-ministino de Edukado el Grandpolio

2. s-ino Lidia Geringer de Oedenberg (favora por Esperanto) el Vroclavo

ne eniris la Eŭropan Parlamenton

1. prof. d-ro Tadeusz Iwiński (**esperantisto** kaj Vicprezidanto de Pola Parla Grupo Subtenanta Esperanton) el Olstino

2. s-ino Joanna Senyszyn (favora por Esperanto) el Krakovo/Gdinio.

El la partio *KNP (Kongres Nowej Prawicy) Congress of the New Right Kongres

Nowej Prawicy

eniris la Eŭropan Parlamenton

1. s-ro Janusz Korwin-Mikke (esperantisto, kiu bedaurinde antaŭ multaj jaroj kabeiĝis) el Silezio, loĝas en Varsovio

Eduardo Kozyra

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de majo 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Enric Baltasar

Lorenzo Noguero, Halina Komar, Robert Roßmann, Spiros Sarafian, Jozefo E.

Nagy, Didier Janot, Lu Wunsch-Rolshoven, Manfred Westermayer, Eduardo Kozyra

kaj Zlatko Tišljar

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

